

PRI „SPIRITO DE LA KONCILIO“

Kvankam dokumentoj de la Dua Vatikana Koncilio ne enhavas kaj eĉ ne povas enhavi dogmajn dekliniĝojn, restas la demando, ĉu ili estas kompareble por la legantoj allogaj kaj intereseĝaj kiel ekzemple Konfeso de sankta Aŭgusteno aŭ Teologio de la Korpo de beata Karol Wojtyła. Sed la demando ankaŭ restas, ĉu tio estas ilia celo.

Tiu ĉi koncilio, kiel konfirmas lastaj papoj, estis antaŭ ĉio animzorga. Ĝi donis certajn akcentojn, kiuj ĝis tiu tempo ne estis formulitaj, sed tio ne signifas, ke ili estis principe novaj aŭ aliel nedevenigeblaj. Ekzemple dialogo kun kristanoj de alia konfeso estis sur la persona nivelo praktikata ankaŭ anraŭ la koncilio, same kiel dialogo kun anoj de aliaj religioj aŭ nekredantoj, almenaŭ el flanko de la kristanoj. Tiel cetero antaŭ du mil jaroj komencis en la mondo disvastigi la kristana kredo kaj ĝi tiel disvastiĝas ĝis hodiaŭ. Uzo de perforto anstataŭ interparolo estas facile indentigebla peko kiel antaŭ la koncilio, tiel post ĝi, pure nur el vidpunkto de la evangelio.

En ĉiutaga vivo de la ordinaraj homoj la menciitaj akcentoj kutime aperadas, eĉ sen la scio, ke ilin pritraktis la konciliaj dokumentoj. Tio, ke ilin la Dua Vatikana Koncilio formulis, estas do karakteriza kaj certe kuraĝiga, sed el vidpunkto de la praktikado de la simplaj homoj, ne nur la katolikoj, ne rekte renversiga. La konciliaj tekstoj – ĝis esceptoj – mallonge ne abundas per intelektuala brilanteco aŭ apostola vervo. Eble tial, ĉar ili ne reguligis rilaton al modernismo. Sed ĉiukaze ili „ne donis principan klarigon en rilato de la kredanto al la moderna tempo“, kiel antaŭ nelonge konstatis Benedikto la 16-a. La moderna tempo vere ne estis per la kredo reflektata, precipe kiam temas pri ideologia delirado kaj el ĝi rezultanta barbara furiozado en la 20-a jarcento aŭ pri akapareco (kp. Rea 23,20), sur kiu

staras anonima diktaturo de la nuntempa konsumismo.

Sed pli grava problemo koncernas la internan vivon de la eklezio. Se iu do komencos kompreni koncilion kiel ununuran fonton de sia eklezia identeco, tiu troviĝas en la senelireja strateto, ĉar la kristana identeco estas donaco de la Dia graco kaj ne la rezulto de la homa memdecido. Krom tio ĝi enhavas ankaŭ dudek antaŭajn ekumenajn konciliojn, kaj ankoraŭ pli multe la fontojn de la eklezia tradicio, kiu literprecize transkreskas kapaciton de kiu ajn unuopulo ĝin elĉerpi kaj enpreni. Nur Dio ĉion enhavas, sed ankaŭ superas.

Se oni reduktas grandegan spiritan trezoron de la aparteneco al la eklezio de Kristo je kelkaj referencoj al iu koncilio, ekaperas nepre idea, pervorta eĉ emotiva inerteco kaj platigita kompreno ankaŭ de la travivado de la kristana identeco. Tiamaniere ekaperas tiel nomata „spirito de la koncilio“, kiu sur tiu Dua Vatikana medie parazitias jam ekde ĝia komenco kaj per antaŭeniĝo de la tempo ĝi nur fortiĝas kaj enradikiĝas. Se la kredanto sin lasas kunkateni per teĥnikisma parolo de tiu ĉi spirito, la sekvoj estas tristaj, kaj tio precipe en la kazo de la pastroj. De amonoj aŭ el kristanaj medioj estas poste ebleco aŭdi malsaĝajn frazojn pri „realigado de la konciliaj decidoj“, pri „progreso, kiun oni kapablis atingi en la koncilio“ aŭ pri „koncilia instruiĝo el kriza evoluo en la eklezio“ kaj simile. Tiu ĉi spirita supraĵeco, kaŝita sub ŝajna fideleco al la eklezia aŭtoritato, detruas en ĝenerala kono ambaŭ: la eklezian aŭtoritaton eĉ obeemon rilate al ĝi.

La konciliajn dokumentojn ne estas necese adori. Ili devas esti simpla formacia ilo de la pastroj kaj ĝenerale de la kredantoj. Aliokaze ilian lokon okupas ĝuste tiu „spirito de la koncilio“, kiu havas nenion komunan kun la Sankta Spirito kaj sub kiu povas ĉiu ajn fakte kompreni, kion ajn. Tiel okazas,

ke kiel frukto de la eklezio estas prezentata io, kion la konciliaj tektoj tute ne mencias, kiel ekzemple „turnon de la altaroj frunte al la popolo“, kion cetere eĉ ne la postkoncilia roma meslibro ordonas, sed proponas nur kiel eblecon. Tiu ĉi „spirito de la koncilio“ estas hodiaŭ fare de iuj respektata pli ol la eklezia aŭtoritato, ja eĉ pli ol mem la Dio. Ĝi estas esprimo de tre subtila, paralela kaj fidrompa teologio, kiu koncentrigas atenton al la homa ego kaj ne al la enkarniĝinta Dio.

Sed tiu ĉi karikaturo de la Sankta Spirito ne estas por la animo nedamaĝa, sed ĝi estas kapabla elvoki vere maturan fieron ĉe siaj adorantoj, kies reciproka adorado kaj

memlaŭdo fariĝas ununura kondiĉo de la komuneco, ununura fonto de senkulpigo eĉ spirita konsolo, sed kiu jam ne devenas de Dio. Koncernas tio tiel nomatajn progresistojn kaj ankaŭ tradiciistojn. Ilia „spirito de la koncilio“ estas nura signo de la sekteca malameco, per kiu oni sin povas barakti en ĉiujn direktojn. Estas mallonge necese ĉesi konkuradon pri tio, kiu plu portos stafeton de venĝeta tersurfaca triumfeco, kaj anstataŭ tio sin turni al venko de Kristo super tiu ĉi mondo, kaj ĝuste tial – kiel tion diras Sinjoro en la evangelio de la sankta Johano – havi en Li pacon (kp. Joh 16,33). ■

Ĉeĥa redakcio de Vatikana Radio